
Gazeto Andaluzia


ANDALUZIO PER SI POR HISPANIO KAJ LA HOMARO

Nº 20 * 5-a JARKOLEKTO * AŬGUSTO '88

D.L. MA-1136/66

esperanto





tiel facila ...

KIEL PRAKTIKA.

NOVA DUKULOKA NUMERO

GAZETO

ANDALUZIA

Fondita en 1910 de D.José Garzón Ruiz

Oficiala Organo de A.E.U.

EDITA - ELDONAS:

Asociación Andaluza de Esperanto
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

"Inscrita en el Registro de Asociaciones del Ministerio del Interior del Estado - Español con el número 56173"

REDAKTOROJ:

Alberto Franco Ramirez — Seviljo
Andrés Martín González — Malago
J.M. Rodriguez Hernández — Kordovo

==========

"La opinioj ĉi tie verkitaj apartenas nur al la subskribantoj"

==========

Presita ĉe Torrox - Malago

Kompostado: J.Herrero

****

ENHAVO

Ĉefatikolo 3
La Trezorkaverno 4
Antarkta Kontinento 6
Komputiloj 8
Krucvortenigmo 12
Strategioj por Esperanto 14
Nun ni 20
Radio en Esperanto 22

****

ADRESOJ

==========

Grupo Esperanto
Apartado 611
14080 CORDOBA

Grupo Esperanto
Apartado 3275
29080 MALAGA

S.E.J.O.
Avda. Reina Mercedes, 49 1º
41012 SEVILLA

Grupo Esperanto
Facultad de Ciencias
GRANADA

Asociación Sevillana de Esperanto
Sol, 75
41003 SEVILLA

Grupo Esperanto
Apartado 13
29770 TORROX

Grupo Esperanto
I.B. "Julio Rodriguez"
MOTRIL

Grupo Esperanto
Mariano de Cavia 34
LA LINEA

Grupo Esperanto
Apartado 320
JEREZ DE LA FRONTERA 11480

****

ĈEFARTIKOLO

Al ĉiu lian parton

Bonsorte, malgraŭ lante, Esperanto ekutilas en entreprenoj kaj organizoj ne apartenantaj al la Movado. Ci-sence bonvenaj estu la franca INTERLAND, la svisa COVALEX SA, la nederlanda BSO kaj la sanmarina AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ, inter aliaj kies estraroj komprenis la taŭgecon uzi la Internacian Lingvon.

Bonvenaj ankaŭ Esperanto-organizoj. Tamen evidentas ke, ĉikaze, ne sufiĉas estigi ilin, eĉ tiujn klopodantajn pri ajna ekstermovada afero, se ili funkcias izole, ne kontaktante aliajn ne-esperantajn organizojn. Kial? Car Esperanto ne apartenas ekskluzive al movadanoj, sed al la tuta mondo. Eĉ plie, Esperanto des pli antaŭeniras, ju pli enradikiĝas en ĉiuspecaj institucioj, organizoj kaj entreprenoj. Tial aplaŭdindas la sinteno de, ekzemple, ĉinaj kaj kordovaj samideanoj sukcesintaj enkonduki Esperanton en la Cina Akademio de Sciencoj kaj en la loka Klubo Amikoj de UNESKO, respektive. Tial imitindas Monda Turismo sukcesinta apliki Esperanton en la turismaj aferoj. Tial la Movado sukcesas nombri en BYDGOSZCZ-provinco (Pollando) 3.000 membrojn, BYDGOSZCZ mem nomiĝas rajte la Meko de Esperanto-Turismo kaj la nombro da deĵorantoj en ĝia loka oficejo de Monda Turismo estas 30.

Ciutage ni bedaŭras, ke Esperanto interesas nur malmultajn personojn en Andaluzio. Kial tiu manko de intereso? Car ni neniam pruvas per faktoj la taŭgecon uzi ĉi tiun lingvon. Kutime oni parolas pri la kapableco de la Internacia Lingvo por solvi la nuntempajn problemojn de nia socio, tamen reale, ekscepte de tiuj pli supre menciitaj kazoj kaj aliaj - ne troaj - komentitaj de tempo al tempo, nenio dirindas.

Oni forgesas tre ofte, ke por disvastigi Esperanton necesas labori serioze, pacience kaj senhalte, ke ne sufiĉas bonaj intencoj kaj varmegaj entuziasmoj, sed nepras la faktoj. Taŭgaj faktoj konvinkas ekstermovadajn personojn pri la utilo de Esperanto. Tio konsistigas nemankeblan kondiĉon por varbi simpatiantojn kaj samideanojn.

Anstataŭ kulpigi iun ajn, ni akceptu nian propran responde-con. Ciu samlanda esperantisto kulpas pri la nekontentiga situacio de la Movado en Hispanio. Ciu andaluzia esperantisto devas labori kune kaj senĉese por solvi la movadajn problemojn en Andaluzio. La venonta Kongreso de AEU, en Jerez, estas bonega ŝanco por pripensi.

Kion vi celas? Kiam vi agados pli esperantistece? Kion vi atendas ankoraŭ?

Andrés Martín

Prezidanto de AEU

HISPANIO EN LA ANTARKTA KONTINENTO


La hispanaj maristoj estis la unuaj kiuj atingis la antarktajn terojn, okazis ĉi tio en marto de 1603 kiam la ŝipestro Gabriel de Castilla kun la ŝipoj *Ciervo Volante* kaj *Bandera Nueva* trovis, puŝitaj de la vento, novajn terojn kiuj ricevis la nomon *Terra Australis Incognita*. Bedaŭrinde ĉi tiu unua vizito ne daŭriĝis per longtempa ĉeesto en la t.n. sesa kontinento.

Preskaŭ 400 jaroj poste Hispanio sendis al Antarkto sian unuan oficialan ekspedicion. La celo de ĉi tiu vojaĝo estas atingi por Hispanio la membrecon en la Antarkta Traktato, subskribita en Vaŝingtono en 1959, traktato kiu devos esti reviziata en 1991. Por esti membro de ĉi tiu aro da landoj nepras la kondiĉo havi unu aŭ kelkajn longtempajn sciencajn bazojn en ĉi tiu kontinento. La traktato estis subskribata de 12 landoj, dume aliaj 17, inter ili Hispanio, deziras esti post 1991 tutrajtaj membroj.

Por atingi ĉi celon diversaj hispanaj institutoj preparas studojn kaj projektojn pri antarktaj temoj, samtempe dum la lastaj jaroj oni aranĝis 6 sciencajn ekspediciojn. Tamen la unua serioza pruvo fondi porĉiaman stacion okazis komence de ĉi tiu jaro. La Ministerio pri Defendo luis la ŝipon *Río Baker* ĉe Valparaiso (Ĉilio), kie oni enŝipigis 8 tunojn da scienca materialo, kune kun specialajn loĝejojn konstruitaj en Finlando.

La 11an de Januaro de 1988 oni hisis la hispanan standardon en la loko kie kelkaj semajnoj antaŭ oni konstruis la sciencan antarktan bazon *Juan Carlos I.* Ĉirkaŭ ĉi tiu unua bazo en la insulo Livigston, ĉe la insularo Sud-Ŝetlando, la lokoj havas hispanajn nomojn, tiel monto *Reina Sofía*, plaĝo *Pepita*, duoninsulo *Ballester*, markolo *España*, ktp. Ĉi bazo estas rekte komunikata kun Madrido pere de radio kaj havas mangaĵojn por 2 jaroj. La plej proksima flughaveno troviĝas ĉe la ĉilia armea bazo de la insulo Reĝo Georgo, ĉe la sama insularo, je 70 mejloj, pli malpli je 5 horoj ŝipante.

En la hispana bazo laboras 20 personoj, sciencistoj kaj militistoj, spertuloj pri jenaj fakoj: oceanografio, telekomunikado, hidrografio, geografio, mapoj, geofiziko kaj geodezio. Ĉi spertuloj konkrete studos la teran magnetizon, tertremojn, vulkanojn kaj ankaŭ mezuros la rezervon da krilo, malgranda oceana besto kun granda energia povo.



(daŭrigo sur paĝo 7a)


(daŭrigo de paĝo 6a)

Sed kies apartenas la Antarkta Kontinento? Ne al la antarktanoj ĉar temas pri senhoma tero. Ĉu al la tuta mondo? Aŭ eble al la UN, ĉu al la landoj kiuj subskribis la Antarktan Traktaton? La Internacia Juro ankoraŭ ne solvis ĉi tiun problemon, sed ja almenaŭ en 1959 oni atingis, dank'al ne konkreta traktato, ke la grandaj ŝtatoj respektos ĉi teritorion, forlasigante la ideon fiksi en Antarkto nukleajn armilojn kaj ankaŭ helpante la sciencan esploron de ĉi tiu grandega kontinento.

Tamen ĉi traktato finiĝos en 1991 kaj multaj aliaj landoj, ne nur tiuj unuaj 12, deziras partopreni en la t.n. blanka kontinento, kaj inter tiuj landoj ankaŭ troviĝas Hispanio.

J.M.R.H.

****



ŜAKPROBLEMO 2/88

Blankuloj ekludas kaj matigas post 4 paŝoj.

(Solvo sur paĝo 11a)

****

6-a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO

Jerez, 3a/6a Decembro 1.988

Centra Temo: "Esperanto kaj la Instruada Reformo"

Sidejo: Residencia Juvenil "Jerez"
Avenida Carrero Blanco, 30
Jerez de la Frontera
Tel. 956-342890

Por peti informojn kaj aliĝilojn:

6º Congreso Andaluz de Esperanto

Apartado 320

11480 Jerez de la Frontera

****

2 ESEOJ PRI LA PRESIGO DE ESPERANTO-LITEROJ EN KOMPUTILOJ

Ekde antaŭ kelkaj jaroj Esperanto ankaŭ estas trovebla ĉe la informatiko, sed neniu entrepreno pensis en la internacia lingvo antaŭ ol konstrui siajn programojn (softvaro). Tamen lastatempe geesperantistoj preparis altkvalitajn programojn kiuj ebligas la uzadon de Esperanto kaj pli konkrete la uzadon de la literoj kun supersignoj. Ĉi tiu artikolo temas pri du solvoj por ebligi ĉe la presilo kaj la ekrano la apero de tiuj supersignoj, tamen ĝi ne estas preparata de komputistoj sed nur de amatoroj, la unua parto temas pri la apero de tiuj supersignoj ĉe PC-kongruaj komputiloj kaj la dua parto pri kiamaniere uzi tiujn samajn literojn en la populara *AMSTRAD PCW 8256*. La aŭtoro de la unua parto estas Francisco José MARTIN DEL POZO kaj de la dua José María RODRIGUEZ HERNANDEZ.

Averto: verkante ĉiun parton oni uzis malsimilajn komputilojn kaj presilojn, kio ja estas komprenebla se tio pri kio ni deziras paroli estas pri supersignoj en malsimilaj komputiloj.

Grava problemo por ni, esperantistoj, estas la neebleco uzi simplan rimedon por skribi niajn supersignojn perkomputile. Kvankam la ĉapeletojn ja havas ĉiuj komputiloj, la progamaro ne ebligas nin uzi ilin rekte.

Por la PC-kongruaj komputiloj, uzeblas kelkaj solvoj:


1) Nur kiam oni ne bezonas la ĉefliterojn, nek tre bonan kvaliton, uzante la tekstoprilaboran programon Wordstar, oni devas:

-Skribi la konsonanton

-Uzi kontrolon P plus la klavon H

-Skribi la supersignon

-Lasi malplenan spacon



Kaj jen la resulto:

c g s h j ĉ ĝ ŝ ĥ ĵ

Evidente, la kvalito ne estas tre bona, estas eĉ neakceptebla por la ĉefliteroj. Kaj surekrane oni ne povas vidi, kion oni poste presos. Oni vidos ĉi tion: c^H

Por la ŭo oni havas nenian problemon: oni povas skribi u,ŭ,ŭ aŭ ŭ, kiel hispanlingve.

La komputilo *AMSTRAD PCW 8256* estas unu el la plej famaj kaj popularaj komputiloj speciale preparata por advokatoj, kuracistoj, profesoroj, ktp, ĉar ne temas nur pri komputilo sed ĉefe, jen mia opinio, **pri belaskpekta presilo kun bona memoro por gardi tion kio estas skribita, prefere informoj, leteroj al klientoj, k.s.**

Bedaŭrinde la programo LOCOSCRIPT kiu akompanas ĉi tiun komputilon nur ebligas la uzadon de supersignoj super la vokaloj, do ne por la literoj c,g,h,j, kaj s. Kion fari do? Iufoje diris al mi samideano kiu posedis ĉi komputilon ke la plej efika solvo estas skribi ilin permane, kaj post multaj elpensoj mi komprenis ke li pravis. Tamen ekzistas solvo, ne tro komforta sed almenaŭ efika, por aperigi tiujn supersignojn esperantajn en nia presilo, jen ĉi solvo:

1) **Unue por nia teksto ni devos meti interlinion ½, tio estas uzi la** klavon *f5/f6*, serĉi la linion "*Interlinea ??*" kaj uzi la klavojn *ALT* kaj *4* samtempe, tiel aperas la interlinio ½.

2) Due ni skribos la tekston normale, t.e. sen supersignoj, por la litero "u" kun supersigno ni skribos "ŭ". Sed atentu post ĉiu linio skribita ni devos lasi alian aŭ du aliajn ne-skribitajn.

Ĉi tiel:

La sipestro kantas en la horo←
←
de la pregejo ciu-jaŭde←.

3) Trie, post skribi la kompletan tekston sen supersignoj ni devos serĉi tiujn literojn kiuj bezonas la supersignojn kaj skribi super ili la supersignojn, memoru ke ĉiu linio havas ne skribitan linion super ĝi. Ĉi tiel:


Ĵa sipestro kantas en la ĥoro←
ĉ ŝ ←
de la pregejo ciŭ-jaŭde.←


4) Tiamaniere ni atingos ke inter la supersigno kaj la litero ekzistos malgranda spaco (interlinio ½). Sed inter ambaŭ skribitaj linioj ekzistos normalan spacon. Mi ankaŭ konsilas skribi la supersignojn kun la karaktero "Negra" por rimarkigi ilin pli bone.

Por agi ĉi tiel estas necesa tempo kaj pro tio konvenas plie uzi la propran bolkrajonon, se tio ne signifas ke ankaŭ ĉe tiu populara

komputilo oni povas skribi la esperantajn supersignojn. Estas grave diri ke germana esperantista programisto atingis per propra programo aperigi la supersignojn en ĉi tiu komputilo, ne uzante aliajn eblecojn kiel ¥ £ kaj similaj, anstataŭigante ilin per la esperantaj supersignoj. **En alia artikolo oni parolos iufoje pri ĉi tiu sistemo.**

(Ĉi tiu dua parto estas skribita per la sistemo proponita en ĝi kaj per komputilo kaj presilo *AMSTRAD PCW 8256*).





SPECIALA VORTARO UZATA EN ĈI TIU ARTIKOLO

PC Kongruaj Komputiloj: Ordenadores Compatibles.

Tekstoprilabora Programo: Procesador de Textos.

Ekrano: Pantalla; Surekrane: sobre la pantalla.

Ŝargi la programon: Cargar el programa (LOAD).

Presilo: Impresora; Klavo: Tecla ; Klavaro: Teclado.

Menuo: Menú (conjunto de alternativas que nos ofrece un programa).

Softvaro: Programas que se pueden utilizar en un ordenador. (SOFTWARE).

Interlinio: Interlínea (espacio que existe entre dos líneas, en el ordenador *AMSTRAD PCW 8256* la interlínea puede ser de ½, 1, 1½, 2, 2½, 3).


****

SOLVO AL LA ŜAKPROBLEMO 2/88

1. tH4 x pH7+ ; rH8 x H7
2. dD1 - H5 + ; rH7 - G8
3. dH5 - F7 + ; rG8 - H8
4. dF7 x pG7 mato.

****

2) Ekzistas alia tekstoprilabora programo, nomita CHIWRITE. Pere de tiu ĉi programo, oni povas vidi la rezultojn surekrane.



La procedo estas:

-Skribi vokalon kun ^ (â_)

-Malantaüeniri, (a)

-Sur la vokalo, skribi konsonanton (ĝ_)

Ekzemploj:

ŝ ĝ ĵ ĥ ĉ Ŝ Ĝ Ĵ Ĥ Ĉ

La neekzisto de hispana versio estas malfacilajo; mi nur konas version kun anglalingva helpo. Sed per ĉi programo oni povas skribi ĉi tiel, *kaj ankaü kurative*, aü uzi dudek malsamajn literklasojn; *Ĉu vi ne ŝatas ĉi tiujn?* Oni eĉ ponas uzi gotikajn. Sed kelkfoje oni povas havi problemojn: ne ĉiaj presiloj eblas presi ĉion, pere de CHIWRITE.

3) La tria solvo estas la plej bona. Ekzistas programo por pliboniĝi la kvaliton de la presado, nomiganta LETTRIX. Pere de ĉi programo eĉ desegneblas literoj. Oni devas ŝargi ĝin antaü ol ŝargi la tekstoprilaboran programon (la presilo devas esti preta presi [ON-LINE]). Presante la klavojn ENTER kaj SHIFT samtempe oni vidas la menuon de LETTRIX. Denove la problemo estas ke la programo donas al ni helpon anglalingve. Sed la literkvalito estas superba, oni povas plialtigi, plilarĝigi (au ambau samtempe) la literojn, uzi kursivon, k.t.p.

Kiel en la una solvo, oni vidas surekrane strangajojn kiel:

xapeletojn, xiuj, plilar&igi, aw, ambaw

kio, jam presita, estas:

ĉapeletojn, ĉiuj, plilarĝigi, aü, ambau

Alia avantaĝo estas la ebleco uzi LETTRIX-n kune kun programoj kiel DATABASE III aü eĉ BASIC. (Nek la unua nek la dua solvoj havigis tiun ĉi eblecon.)

Ankoraü eblas difini literojn en BASIC, sed ĉi eblecon varias en ĉiu presilo (oni konsultu la libron de la uzanto).

La tuta artikolo estis presita pere de la tria solvo, escepte de la dua parto (kiun mi skribis kaj presis pere de CHI-WRITE) kaj la ekzemplo de la unua parto; mi uzis matrican presilon kaj PC-kongruan komputilon. Mi ne scias, ĉu ĉi tiuj solvoj funkcios en aliaj specoj de presiloj.


HORIZONTALE.-

1. Pola kuracisto aŭtoro de lingvo internacia. Inv, frukto.
2. Prepozicio. Plus -babo, afrika arbo. Inv, manifesti ideon.
3. Nomo de litero (adj). Inv, kapabla fari ion rapide kaj facile (adv). Inv,surmara veturilo.
4. Konsonanto. Inv, malplezuro pro neokupiteco. Inv, terspaco.
5. Inv, komunikilo. Ŝarĝbesto. Konsonanto.
6. Konsonanto. Sporta kaj rapida ŝipo. De ĉiu speco, kvalito.
7. Ekzisto. Loko por infanoj sen gepatroj. Konsonanto.
8. Tri literoj de estimata. Laŭtege paroli. Vokalo. Numero.
9. Prepozicio. Virina vestaĵo. Organo de la korpo.
10. Du literoj de enuo. Inv, de iu speco, kvalito. Finaĵo de verboj. Kariba lando.
11. Elmeti ion al necerto aŭ danĝero (nomo). Konsonanto. Substanco kiu troviĝas sub la haŭto.
12. Vokalo. Konjunkcio. Vokalo. Kvar literoj de Norio.
13. Sen la lasta vokalo, konstanta neo. Latina mil. Inv, havi pli malpli klaran ideon pri iu, io (nomo). Vokalo.
14. Metapsikia fenomeno konsistanta en senpera komunikigo de du mensoj, je pli malpli granda distanco, per aliaj rimedoj ol la ordinaraj sensaĵoj. Tuto.
15. Inv, ridindigi iun aŭ ion. Inv, eminenta spirita kapablo, ĉu donacita de naturo, ĉu akirita per laboro (akuz).
16. Konsonanto. Aro da konfuzaj sonoj (infinitivo). Afrika sovaĝa besto (adj).
17. Planedo. Du literoj de amu. Konsonanto. Vokalo.
18. Lirika Poemo omaĝe iun aŭ ion (adj). Inv, esti en ne-militanta stato kontraŭ alia (imperativo). Inv, fari kavaĵon eltirante teron.
19. Urbo kie okazos la 6a Andaluzia Kongreso de Esperanto. Magneta Metalo.
20. Malaltuloj (plur.). Inv, diferenca, malsama. Unua vokalo.

VERTIKALE.-

A. Ĉevalo en piĵamo. Personoj kiu simpatias al la kreaĵo de tiu pola kuracisto pri kiu ni parolis ĉe Horizontale 1.
B. Virina nomo. Transdoni al iu konojn kaj sciojn. En esperanto komencliteroj de internacia organizo al kiu Hispanio kaj Portugalio apartenas ekde 1986. Sen la lasta vokalo la loko kie unue loĝis Adamo kaj Eva.
C. Konsonanto. Inv, prepozicio. Orienta Filozofio. Linio dividita per egaldistancaj streketoj kiuj montras la dimensiojn de desegnaĵo rilate al efektiva objekto. Altvalora pro sia malofteco.
Ĉ. Loko kiu havas nek montojn nek kavaĵojn, kaj ĉio estas proksimume ĉe sama nivelo. La plej supera lingva instanco. Prepozicio.
D. Kunaĵo de ĉio kio ekzistas en la mondo (adj). Laŭtegaj voĉsonoj. Konsonanto. Vokalo. Utiligo de io.
E. La tago havas 24. Aro da kantistoj. Litkusenoj.
F. Vokalo. Vokalo. Distingilo. Ĉe primitivuloj religieca institucio kiu igas netuŝeblaj iujn personojn aŭ objektojn aŭ nefareblaj iujn agojn (adj).
G. Scienco pri la esencaj plej ĝeneralaj principoj kaj kaŭzoj de la estado. Tri literoj de lito. Sincere kaj ame respekto plena al Dio kaj religiaĵoj (adj).
Ĝ. Vokalo. Negacio. Vokalo. Du samaj konsonantoj. Inv, kaj sen la lasta vokalo afrika sovaĝa besto. Pronomo.
H. Inv, ĥemia elemento, gaso kiun oni uzas ĉefe por la lumigado. Monato. Pro nenia kaŭzo.
Ĥ. Mallaŭdi iun por esprimi malkontentigon kaj provi plibonigi lian konduton (nomo). Frukto. Inv, kaj sen la lasta vokalo, kurba tenilo por preni, porti, tiri, levi aŭ malfermi.
I. Kvar literoj de la vorto Pie. Vokalo. Gaso kiu ekzistas en la atmosfero kiu protektas nin kontraŭ la sunaj radioj. Nedifina pronomo montranta iun objekton (akuz). Du samaj vokaloj.
J. Necesa por sendi leterojn. Inv, tre amata amikino. Unua vokalo.

GIGANTA KRUCVORTENIGMO



EBLAJ STRATEGIOJ POR ESPERANTO

(Parolado de Gian Carlo Fighiera okaze de la 48-a Hispana Kongreso de Esperanto, Valencio 1.988).

Ni eniris en la jaron 101 de la internacia lingvo Esperanto. Se la kreinto de Esperanto hodiaŭ plue vivus inter ni, li ne plu rekonus la mondon, por kies progreso li tiom luktadis. Kio ŝanĝiĝis?

Hodiaŭ ne plu okazas la kruelaj pogromoj, kiuj en lia epoko turmentadis centran kaj orientan Eŭropon. La celoj de la sionismo, por kiuj li aktive agadis en siaj studentaj jaroj, plenumiĝis, sed je kosto de konstanta milito inter du semitaj etnoj kaj per malfermo de aliaj vundoj. Aliflanke, interetnaj konfliktoj plue restas: diasporaj minoritatoj vane serĉas politikan identecon; rasismo vivadas en la menso de la homoj kaj en la leĝoj de iuj landoj.

De post tiu fatala 1917, la mondo trasuferis du tutmondajn militojn - naciisma la unua, naciisma-ideologia la dua -, dividiĝis en la kontraŭstarantajn ekonomiajn kaj politikajn blokojn, kiuj ĵus aliris la vojon de senprecedenca kunlaborado kaj eĉ de parta malarmado.

Scienca kaj teknika revolucio kreis la modernan informatikon, renversis la tradiciajn rimedojn de transportado kaj komunikado, startis la esploradon de la universo kaj la siderajn raketveturadojn.

Eŭropo rezignis je siaj kolonioj. Giaj landoj ne plu militagresas unu la alian. Unuafoje en la historio, la malnova kontinento konsciiĝis pri sia kultura unueco, kaj de pli ol 40 jaroj ĝi vivas en paco kaj en perspektivoj de integriĝo. La potenca energio kaŝita en la atomo estis liberigita, unue utiligita por krimaj celoj, poste kiel minacoplena gardostaranto de paco, fine por civilaj aplikoj.

Post la morto de Zamenhof, la industria erao ekspansiadis, atingis sian zeniton kaj komencis dekadenci: aŭrore ekaperas la postindustria epoko, en kiu pli ol produktado de agrikulturo kaj uzinoj gravos la terciaraj servoj. Sanceliĝe ekbrilas la espero, ke venontaj generacioj vivos en socio libera de dogmaj jugoj, en kiu la laboro ne plu estos Biblia malbeno, sed fariĝos digna plenumiĝo de homaj aspiro kaj digno; socio, en kiu la homoj postulos ne tutsimple la rajton vivi, sed la rajton vivi kvalitan vivon.

La diritaj sociaj transformiĝoj dislokigis sociajn klasojn, ebenigis sociajn diferencojn, forigis kaŭzojn de intercivitanaj konfliktoj kaj malradikaligis la politikan vivon: hieraŭaj revoluciuloj hodiaŭ fariĝis mildaj reformuloj.

Ne, Zamenhof ne povis imagi kiel aspketos la mondo en la jaro 101 de lia lingvo. Li ne povis imagi la novajn tutmondajn problemojn de la nuno: superevoluo de la norda emisfero kaj subevoluo de la suda; pli ol paŭperismo, subnutrado, malsato kaj demografia eksplodo karakterizas la Trian Mondon, dum endemia senlaboreco frapas la ricajn landojn. Lia racia pensado eĉ ne povus koncepti, ke la homo eltrovos du novajn rimedojn por senkonscie detrui sin mem.

Temas, unuflanke, pri la rompo de la ekvilibro de la naturo, kaj, aliflanke, pri la drogo. Ambaŭ esprimas la viv-angoron de la homoj teknike ĉiam pli riĉaj, etike ĉiam pli mizeraj, ĉe la sojlo de la dua jarmilo.

En tiun ĉi realon enŝoviĝas la Zamenhofa propono de internacia neŭtrala lingvo.

Cu la lingvo kaj ties Movado evoluis samrapide kiel la ekstera mondo? Certe, Esperanto progresis ek de 1887, kiam ĝia adeptaro konsistis el unu persono kaj ĝia literaturo el unu lernolibro. La oficialaj rekonoj malfruis, kostis multajn penojn, sed ili ekzistas. Sen paroli pri la publikaj agnoskoj en formo de centoj da Esperanto-stratoj, placoj, monumentoj kaj poŝtmarkoj, elstaras inter la rekonoj la du rezolucioj de UNESCO. La unua, akceptita en Montevideo, en 1954, "notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo". La dua rezolucio, adoptita en Sofio, en 1985, deklaras, ke "Esperanto faris konsiderindan progreson kiel ilo de kompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj de malsamaj landoj, penetrante en la plimulton de la regionoj de la mondo kaj la plimulton de la homaj agadoj".

La menciitaj dokumentoj sankciis novajn poziciojn de la Esperanto-Movado. Ci-lasta forlasis la introvertitan sintenon de siaj pratempoj, kaj konsciiĝis pri la vera esenco de sia mesaĝo. Nome, Esperanto estas nek filozofio nek religio, sed lingvo, do komunikilo. Same kiel ĉiuj lingvoj, ĝi ĉiel servas por interhoma komunikado kaj ludas nemalhaveblan kulturan kaj socian rolojn kiel instrumento de civilizo. La sola diferenco de roloj inter lokaj, naciaj kaj internacia idiomoj estas teritoria. Esperanto proponas sin al la tutmonda komunumo, sed respektas la poziciojn de la aliaj lingvoj en iliaj respektivaj lokaj kaj naciaj roloj.

Car ni parolas pri la Esperanto-Movado en la jaro 101, ni klarigu, ke la Movado ne estas celo en si mem, sed rimedo por la disvastigo de la lingvo. Kvankam en la nuna momento la Movado ankoraŭ provizas servojn al siaj membroj kaj rolas kiel renkontejo de nia diligenta kolegaro, la celoj de la Movado estas atingi stadion, en kiu la ĝeneraliĝo de la internacia lingvo igos superflua la ekziston de la Movado mem.

Se montriĝos nepraktike kunigi en unu organismon la servan kaj la disvastigan rolojn, tiam necesos dividi la diritajn du funkciojn kaj antaŭvidi organismon kompetenta por ĉiu el ili. Same kiel la lingvo kaj la Movado siatempe apartiĝis per la kreo de du sendependaj institucioj, UEA kaj la Akademio same du apartaj instancoj povus okupiĝi respektive pri la servoj al la membraro kaj pri la propagando de la lingvo.

Senkonsidere pri la supra principa demando, estas evidente ke, spite de sia malgrando, la Esperanto-Movado estas solide organizita en kapilana geografia kaj faka strukturo. Eĉ, oni rajtus levi la demandon ĉu la Movado ne estas superorganizita, ĉu tro multa baraktado ne perdiĝas en la vivtenado de internaj strukturoj, anstataŭ ol direktiĝi al ekstera informada laboro. Alia demando koncernas la financajn rimedojn: la Movado restas malriĉa, sed multe malpli ol en la pioniraj kaj antaŭmilitaj tempoj.

Dank'al la favora ekonomia evoluo de la mondo, publikaj kaj privataj kreditoj ofte estas disponeblaj por tiuj naciaj, lokaj kaj fakaj Esperanto-organizoj, kiuj kapablas ellabori konkretajn projektojn. Aldone al tio, utilas konstati, ke la Esperanta mecenatismo per kunigitaj fortoj ĉiam kapablas grandajn farojn.

Transirante, nun al alia kampo, ni substreku kun ĝojo pozitivan fenomenon. Ek de la tempoj de Zamenhof, la mondo senmezure kleriĝis paralele al la disvastiĝo de la edukado. La samo okazis ankau en la Movado, en kiu hodiau konverĝas senkompare alta nombro da intelektuloj. Ili ne sentu sin fremdaj en niaj vicoj, sed trovu en nia komuna vivo taugan terenon por disvolvi sian personecon. Evidente, la plimultiĝo de la intelektularo reflektiĝas en la kreskado de la literaturo en la internacia lingvo. Se oni konsideras, ke ĉiusemajne aperas minimume tri novaj verkoj en Esperanto, oni rajtas konkludi, ke Esperanto estas supozeble la lingvo en la mondo, kiu produktas plej multe da literaturaj verkoj, proporcie al la nombro da legantoj.

Cetere, la Esperanto-parolantoj estas beletre tre kvalitkonsciaj: tio klarigas la relative altan lingvan nivelon de la Esperanto-verkoj kompare al nacilingvaj eldonaĵoj.

Ci tie ne estas loko por detale analizi la laufakan disdividon de la literaturo en la internacia lingvo. Ni rapide rimarku nur du ĝiajn aspektojn. Unue, la tradukita literaturo ĉefe prezentas klasikajn autorojn, sed neglektas la nuntempajn. Due, superabundas en la libroproduktado beletro kaj maloftas scienco kaj tekniko, kio signifas malekvilibron bezonantan korekton.

Gis nun, ni analizis la organizan strukturon kaj la literaturan kreadon de la internacia lingvo. Restas la praktika uzado. Ci tie kuŝas la malforto de Esperanto, unu jarcenton post ĝia kreiĝo.

Estas vero, ke la lingvo estas vaste uzata de ĝiaj adeptoj, por interpersonaj internaciaj rilatoj: korespondado, kongresoj, seminarioj, vojaĝoj, k.s. Tamen, estas ankau vero, ke Esperanto ne kontentige aplikiĝas en la diversaj kampoj de la moderna vivo: en pura kaj aplikita esplorado, en scienco kaj tekniko, en industrio, komerco, turismo kaj en ĉiuj aliaj fakoj. Jen nur unu ekzemplo: La Esperantofona mondo jam de kelka tempo ĉesis instigi internaciajn fojrojn, industriojn, Komercajn ĉambrojn kaj flug-kompaniojn utiligi la internacian lingvon. Feliĉe, la utiligado de Esperanto fare de pluraj fervojoj, plej unue el la eldonado de horaroj, restas brila modelo de praktika apliko de Esperanto.

Kiel jam dirite, por akceli la disvastigon de Esperanto, ni hodiau posedas instrumenton, kiu ne ekzistis en la jaro 1 de nia historio: la Esperanto-Movado. Ni diru tiurilate, ke ĝia ekstera bildo ne povas esti nur tiu de simpla amikaro, kiu agrable kunvivas. Tiu ĉi sinteno estas mallongvida kaj danĝera por la internacia lingvo. Necesas, ke la dirita ekstera bildo Movada identiĝu al tiu de kultura organizo kun socia programo, kiu proponas al la homaro solvon de tutplaneda problemo, Tio implicas, ke ĉiuj niaj agoj, eĉ la internaj, respektu la bildon de la seriozeco de Esperanto. Se ni mem ne respektas nian lingvon, ĉu ni povas postuli, ke la aliaj respektu ĝin?

La marketingo de Esperanto kaj de ties Movado estas la baza forto sur kiu baziĝas la progreso de la internacia lingvo. Kelkaj faktoroj gravas tiurilate, inter alie tiu de la instrunivelo de la lingvo. Ne mankas novaj kursoj de Esperanto: mankas bonaj lernolibroj kaj taŭgaj instruistoj. Nur en malplena da landoj eblas trovi minimuman elekton da esperantaj lernolibroj: en la aliaj landoj la lernemuloj disponas pri malnovaj, eĉ antaŭmilitaj, lerniloj kaj vortaroj, ofte amatore kaj senmetode verkitaj de nekvalifikitaj instruantoj.

Vere dirite, kiam la instruado ne okazas per rekta metodo - kiu estas eĉ pli malfacila por la instruisto ol kiu ajn alia metodo -, serioza lernanto bezonas havi en siaj manoj ligilon kun la lingvo, nome oportunan lernolibron, kiun li povu hejme konsultadi, en kiu li trovu krom vortareto, abundajn ekzercojn, literaturajn legaĵojn, informojn pri la strukturo, la valoroj, la praktika aplikado, la celoj, la gazetaro, la literaturo kaj la organizo de la internacia lingvo. Ĉio tio formas tuton, sen kio la lernanto estas perdita por Esperanto.

En la unuaj tempoj, la argumento pri la absoluta facileco de la lingvo superregis ĉiujn aliajn argumentojn en la Esperanta informado. Hodiaŭ, la grava progreso de la edukado en la tuta mondo senteble malgrandigis ĝian signifon: neniu meze klera persono estus nuntempe allogita, eĉ male, de lernolibro en formo de mikroskopa ŝlosilo. Esperanto estas sesoble pli facila ol la naciaj lingvoj, sed ĝi tamen estas lingvo literatura, kaj por lerni ĝin neniu povas eviti la necesan peneton. Kion ni gajnas, se per malkorekta argumentado ni malfermas amase vizitatajn kursojn, kiuj postlasas nur malplenon aŭ se ni kreas novajn generaciojn da eternaj komencantoj? Cu ne pli bone forgesi la kvanton kaj flegi la kvaliton, atendante la tempojn, kiam la kvalito mem siavice transformiĝos en kvanton?

Krom la instruado, ankaŭ aliaj sektoroj de la agado por la internacia lingvo bezonas plibonigon. Estas sendube malfacile por Movado kiel tiu ĉi, malriĉa je homaj kaj financaj rimedoj, labori laŭ tute modernaj sciencaj metodoj. Aliflanke, necesas agnoski, ke je monda kaj nacia niveloj - eĉ pli ol je loka - mankas klara tuteca strategio por la disvastigo de la lingvo. La agado aspektas en sia tuto intensa, sed improvizita kaj diserigita en tre multaj direktoj, tiel ke progresoj en ĉiu el ili ne estas rimarkeblaj. Nepras, sendube, ekspluati ĉiun favoran cirkonstancon, kiu subite prezentiĝas, sed tiu ĉi sana oportunismo devas esti komplemento, ne fundamento, de nia strebado. Car la Movado ne povas ĉion fari samtempe, ĝi fiksu al si strategiajn prioritatojn kaj koncentrigu en ili siajn fortojn.

El la multaj eblaj vojoj, kelkaj ŝajnas pli facile alireblaj ol aliaj. Temas, ekzemple, pri jenaj:

A) IDEA BAZO.

Utilas prepari novan kaj modernan motivadon por pravigi la lernadon de Esperanto. La pure idealisma motivado ne devas subite tute malaperi, des pli ke momente ne eblas anstataŭi ĝin per la motivado de la praktika utilo de la lingvo. Tamen, en la Esperanta informado la idealisma komponanto devus esti reduktita al pli korektaj proporcioj kaj esprimita en pli klara maniero ol ĝis nun okazis.

Flanke de la supre dirita, aliaj motivadoj meritas seriozan pristudon niaflanke kaj emfazon en la ekstera laboro. Kelkaj el ili havas pure lingvan signifon, sed ilia frapoforto en kleraj medioj estas unuaranga. Sufiĉu mencii la tre priparolatan, sed nesufiĉe utiligatan, argumenton de la propedeŭtika valoro de Esperanto.

Ekzistas pluraj aliaj valoroj kaj motivadoj kun pli ĝenerala intereso, sed ne eblas analizi ilin ĉiujn en la kadro de tiu ĉi prelego. Preterpase, ni menciu nur la socian lernomotivon, bazitan sur la deziro de la lernemulo partopreni per Esperanto en internaciaj interhomaj rilatoj kaj en vojaĝado eksterlanden. Cirilate, ni ne rajtas prisilenti la fakton, ke ĉi internaciaj rilatoj pli maloftas per Esperanto ol per aliaj naciaj lingvoj; tamen, ni devas ankaŭ agnoski, ke la pritemitaj interrilatoj per Esperanto estas impregnitaj je homa nivelo de supernacia spirito de tuthomara kompreniĝo, kiun nur neŭtrala lingvo povas doni, kaj tial ili estas kvalite, sed ne kvante, pli valoraj ol la komunikado per aliaj lingvoj.

Nevenkebla kaj universale akceptita prezentiĝas, krome, la politika argumento, ke Esperanto garantias la egalecon de la naciaj lingvoj en internacia kadro kaj defendas la etnajn lingvojn. Jam de longe, la subtenantoj de la internacia lingvo defendas la principon de laŭbezona du- aŭ tri-lingvismo: etna lingvo aŭ dialekto, se ekzistas, loke; nacia lingvo, tutlande; Esperanto, tutmonde.

En ĉi tiu kunteksto situas la demando de la angla lingvo, kiun ne licas strute ignori ke la angla lingvo ludas praktike internacian rolon, neniu neas, sed, ke ĝi proponas la plej oportunan solvon de la monda lingva problemo, neniu emas kredi. Por objektive alfronti la demandon de la angla lingvo, necesas unue koni la ekzaktajn konturojn de la fenomeno, nome distingi inter realo kaj mito. Tiu ĉi kono mankas al ni, same kiel mankas analizo de la ĉefaj antaŭjuĝoj kontraŭ la internacia lingvo, kaj komuna respondo al ili.

B) STRATEGIA AGADO.

Zamenhof intencis kolekti 10 milionojn da individuaj deklaroj de homoj pretaj lerni Esperanton, sed tiu politiko montriĝis nerealisma.

Poste, la Esperanto-Movado provis konvinki internaciajn instancojn - la Socieron de la Nacioj kaj la Unuiĝintaj Nacioj- ke ili instigu la ŝtatojn enkonduki Esperanton en la lernejojn. La strebadoj ne sukcesis, kvankam ili produktis la du tre gravajn moralajn agnoskojn flanke de UNESCO pri la valoro de Esperanto.

Alvenis nun la momento pripensi, ĉu ne estus konsilinde forlasi tiujn tutmondajn vojojn kaj komenci anstataŭe naciajn politikojn de malgrandaj paŝoj kunordigitaj internacie. La naciskalaj eblecoj estas multaj: pri ilia elekto kompetentas la landaj Esperanto-Asocioj. Ni konsideru unu el la eblaj agad-modeloj, tiun de la akiro de leĝo aŭ dekreto por la oficiala instruado de la internacia lingvo, komence nur en specialaj kursoj aŭ fakoj aŭ elementaj lernejoj, en la kadro de ŝtataj instru-programoj. Tia leĝopropono iras tra naciaj parlamentoj, sed en kelkaj landoj ĝi povas koncerni, almenaŭ parte, la regionajn aŭtoritatojn.

Necesus en tiu kampo prepara jura laboro por eltrovi en la aktualaj instru-leĝaroj ŝancon por Esperanto. En dua stadio sekvus informado pri Esperanto al la koncernitaj parlamentanoj kaj, fine, la prezento kaj la voĉdono de leĝo-projekto.

La skizitan metodon sekvis, postmilite, kelkaj landoj, ekz. Francio, Italio kaj Nederlando. Nenie ĝi registris vere netan malvenkon: aŭ la projekto falis pro frutempa fermo de la parlamenta labor-periodo kaj kunvoko de novaj balotoj, aŭ ĝi estis rifuzita per tiom malgranda plimulto, ke tio lasis esperon de venontfoja sukceso.

La dirita parlamenta agado celas akiri modestan enkondukon de Esperanto en iajn lernejajn programojn, kun la konvinko, ke la ecoj de Esperanto certigos la sukceson de la eksperimento kaj kreos la kondiĉojn de ĝia posta ampleksigo. Favoraj rezultoj paralelaj en kelkaj landoj akcelus la iompostioman venkon de la agado. Alivorte, necesas komence enŝovi en la jarmilan muron, kiu "forte staras inter la popoloj dividitaj" la maldikan ekstremon de kojno kaj disrompi la masonaĵon per nepercepteblaj puŝoj.

Ni kune analizis hodiaŭ kelkajn demandojn kaj eblajn strategiojn de la internacia lingvo en la dua jarcento de ĝia vivo. Ni akcentis la neceson krei pozitivan bildon de Esperanto; substrekis la urĝon, ke la naciaj movadoj disponu pri profesinivelaj instruiloj, allogaj ankaŭ por intelektuloj; ke la valoroj de la lingvo kaj la motivadoj lerni ĝin estu science esploritaj fare de la periferia movado; ke ni aliru politikajn vojojn por parte oficialigi la instruadon de la internacia lingvo en lernejoj.

Aliaj demandoj kaj aliaj strategioj ekzistas kaj meritas fundan esploron. Kiel diris Prezidanto Tonkin en Varsovio, intertempe urĝas, ke la adeptoj de Esperanto ne nur ĝuu sian lingvon, sed kuraĝe, konstante, kunordigite kunlaboru por ĝia disvastigo en la mondo.

GIAN CARLO FIGHIERA.

****

ADRESARO 1.988 (kun personfotoj)

ni sendos al ĉiu, kiu deziros sin enrigistri

en Adresaro 1.989.

Petu enskribilon al:

TUTMONDE, PACIFISTA MOVADO

Apartat 312, E-08220

TERRASSA

(Hispanio)

****

NUN NI

AEJ

* * * * JUNULARA ALDONAJO AL GAZETO ANDALUZIA * * * * *



ĈU IJK EN ANDALUZIO ?

Eke ŝajnas eĉ amuze pripensi la eblecon organizi Internacian Junularan Kongreson en Andaluzio, tamen se ni serioze studas la rimedojn, eblajn helpojn kaj ĉefe la profitplenan rezulton por nia regiona movado, ne aspektas tiel nekredebla afero.

Ĉu ni trovus areton da gejunuloj pretaj laboregi? Sufiĉus komence nur 5! Ĉu ni trovus taŭgan lokon? Malago, Seviljo, ks. Ĉu la Estraro de TEJO aprobus nian pro-- ponon?

Ĉi tiujn kaj aliajn kromajn demandojn ni pruvos respondi en Jerezo.

KUNPORTU SPORT-VESTAĴOJN

Ni konsilas al ĉiuj gejunuloj kiuj planas iri al Jerezo kunporti sportajn vestaĵojn, pro la fakto ke la restadejo havas kestopilkejon.

CURSOS DE ESPERANTO

Si sólo eres simpatizante de nuestra lengua y deseas aprenderla te recordamos los centros donde se enseñará la lengua internacional Esperanto durante el curso 88/89.

SEVILLA:
* Academia Sevillana de Esperanto. C/ Sol 75
* Casa de la Juventud. Villa Julita.

CORDOBA:
* Casa de la Juventud. C/ Adarve 2
* Instituto de Bachillerato SENECA.
* Instituto de Bachillerato LOPEZ NEYRA.

JEREZ DE LA FRONTERA
* Casa de la Juventud.


Creemos que también se impartirán cursos en Málaga, Rota (Cádiz) y Granada.



VENONTA HEJS-TENDARO

La venonta HEJS-Tendaro okazos dumpaske en Vitorio-Gasteizo. Pliajn informojn ni baldaŭ esperas ricevi de la Alava Esperanto-Asocio. Ni estas tute certaj ke kelkaj andaluzoj vojaĝos tien.


Laŭ la regularo de nia asocio rilate la propagandon de la kandidatoj okaze de la kvarjara elektado de la Estraro, oni decidis aperigi specialan paĝon en GAZETO ANDALUZIA NUN NI-Paĝoj por prezenti la kandidatojn. La publikigado de ĉi anoncoj estas tute senpara ka a-muza.



Ĉi fotografaĵo montras al ni grupo de kandidatoj por esti nomumitaj estraranojn de AEV.

Kion ili promesas? Nur unu afero, ANTAŬENIRIGI Esperanton en Andaluzio kaj por tio ili estas pretaj PAŜI KIEL EBLE PLEJ LONGE kaj e-fike kaj tra-fike.

Ni estas tute certaj ke iliaj paŝoj estos tute antaŭenirigaj.



ANDALUZIA ESPERANTO - JUNULARO

AEJ

SECCION ANDALUZA DE JOVENES ESPERANTISTAS

Kion vi atendas por prezenti vin mem kiel kandidaton por Prezidanto de AEV, Ni ne petas specialajn kvalitojn eĉ ne labor-kapablon, La AEV-Prezidanteco ne estas tiel peza tasko, Do faru kiel la kandidato kiu aperas en ĉi tiu fotografaĵo kaj trinku vin mem por esti prezidanto,

Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al la redaktoro de ĉi tiu rubriko: s-ro Georges Larglantier, 29 bvd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Ĉi-sube estas la elsendhoroj laŭ Universala Tempo (UTC), antaŭe nomata Grenviĉa Meza Tempo (GMT).

ĈIUTAGE

05.30-06.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27 (7270 kHz). Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.
11.00-11.25 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.50m (9525 kHz).
11.00-11.30 Pekino, 43.13m (6955 kHz), 31.64m (9480 kHz). Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.
13.00-13.30 Pekino, 25.75m (11650 kHz), 19.50m (15385 kHz).
15.30-15.55 Varsovio, 41.18m (7285 kHz), 31.01m (9675 kHz).
16.30-16.55 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).
19.30-20.00 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).
20.00-20.30 Pekino, 40.16m (7470 kHz), 32.03m (9365 kHz), 30.10m (9965 kHz).
21.30-21.55 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).
22.30-23.00 Pekino, 31.15m (9630 kHz), 26.05m (11515 kHz).

LUNDE

16.30-16.40 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

MERKREDE

01.15-01.25 Berno, 50.29m (5965 kHz),48.90m (61.35 kHz), 30.85m (9725 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).
03.15-03.25 Berno, 48.90m (6135 kHz), 30.85m (9725 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).
07.45-07.55 Berno, 31.38m (9560 kHz), 30.35m (9885 kHz), 25.20m (11905 kHz), 19.27m (15570 kHz).
10.45-10.55 Berno, 25.14m (11935 kHz), 19.27m (15570 kHz), 19.25m (15585 kHz), 16.83m (17830 kHz).
13.15-13.25 Berno, 25.20m (11905 kHz), 25.09m (11955 kHz), 19.27m (15570 kHz), 19.25m (15585 kHz), 16.83m (17830 kHz).
15.15-15.25 Berno, 30.35m (9885 kHz), 25.34m (11840 kHz), 19.44m (15430 kHz), 16.83m (17830 kHz).
17.15-17.25 Berno, 30.35m (9885 kHz), 25.09m (11955 kHz), 19.58m (15325 kHz). 19.44 (15430 kHz), 16.83m (17830 kHz).
22.15-22.25 Berno, 50.29m (5965 kHz), 31.17m (9625 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).

ĴAŬDE

05.00-05.15 Vatikano, 186m (1611 kHz), 48.00m (6250 kHz), 41.38m (7250 kHz), 30.75m (9755 kHz), 25.61m (11715 kHz). Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.
16.30-16.40 Berno, kiel lunde.

SABATE

16.30-16.40 Berno, kiel lunde.
20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, Centro Corrispondenza, I-00100 Roma, Italio.
Berno, kiel merkrede.

DIMANĈE

05.30-05.45 Vieno, 50.00m (6000 kHz), 48.74m (6155 kHz), 31.25m (9600 kHz), 31.14m (9635 kHz), 19.47m (15410 kHz). O.R.F., Esperanto-fako, A-1136 Wien, Aŭstrio.
09.30-09.45 Vieno, 50.00m (6000 kHz), 48.74m (6155 kHz), 25.18m 11915 kHz). 30.98m (9685 kHz), 19.47m (15410 kHz).
11.05-11.15 Budapeŝto, M.F. 67.04 MHz, 67.97 MHz, 68.24 MHz, 68.36 MHz, 68.48 MHz, 68.72 MHz, 69.38 MHz, 70.10 MHz, 70.43 MHZ, 70.64 MHz, 72.08 MHz. Programo preparita de Radio Pécs, Esperanto, Pf. 200, H-7601 Pécs, Hungario.
19.00-19.10 Vatikano, 570m (526 kHz), 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 48.00m (6250 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64m (11700 kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj MF 93.0 MHz, 96.5 MHz. (ankaŭ je festotagoj).
21.45-22.00 Zagrebo, 262m (1143 kHz). Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

DIREKTITAJ ONDOJ

Berno: je la 01.15h al Centra kaj nordo de Suda Ameriko; je la 03.15h al Centra kaj Norda Ameriko; je la 07.45h kaj 10.45h al Malproksima Oriento; je la 13.15h al Oriento; je la 15.15h al Proksima Oriento; je la 17.15h al Arabio kaj Afriko; je la 22.15h al Suda Ameriko. **Pekino:** je la 11.00h al Japanio kaj Koreio; je la 13.00h al Sudorienta Azio; je la 20.00h al Eŭropo; je la 22.30h al Centra kaj Suda Ameriko. **Vatikano:** 1530, 9625, 11700 kaj 15120 kHz je la 1900h al Afriko. **Vieno:** 15410 kHz al Proksima Oriento.

SEZONA HORŜANĜO

Ekde la 27a de septembro 1987 la elsendoj el Berno (nur la eŭropa programo je 16.30h), Budapeŝto, Vatikano, Zagrebo estas aŭskulteblaj horon pli malfrue laŭ UTC..

ALIAJ STACIOJ

(urba aŭ regiona aŭdebleco; horoj laŭ loka tempo)

Brazilo: Sorokaba (ZYK669), 1080 kHz, vendrede, 21.00-22.00h; **Rio de Ĵanejro** (ZYJ462), 1400 kHz, dimanĉe, 19.30-19.45h (Brazila Spiritisma Federacio).
Hispanujo: Kordovo, 94.3 MHz, sabate, 12.00-12.20h (Radio Libera Lupeo).
Italujo: Verono, 1621 kHz, 100.5 kaj 100.8 MHz, lunde kaj ĵaŭde, 22.30-22.40h (Radio International). Horoj laŭ *loka tempo* por ĉi tiuj stacioj.

Aŭskultu kaj reagu!

La ekzisto de ĉi tiuj radioelsendoj dependas de ilia popularеco.

Skribu foje al radiostacio!

POR MUCHAS VUELTAS QUE DES



EN TODOS LADOS ENCONTRARAS AMIGOS.